# EL POPOLA ĈINIO

人民中国报道

Aldono al n-ro 12, 1972


## Vizito de Ĉefministro Tanaka Kakuej al Ĉinio







Laŭ la invito de Ĝoŭ Enlaj, ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko, Tanaka Kakuej, ĉefministro de la Kabineto de Japanio vizitis la Ĉinan Popolan Respublikon de la 25-a ĝis la 30-a de septembro 1972.

Je la 27-a de septembro, Prezidanto Maŭ Zedong intervidiĝis kun Ĉefministro Tanaka Kakuej, en Ĝongnanhaj. Ambaŭ flankoj faris seriozan kaj amikan interparolon por unu horo.

Post la interparolado, Prezidanto Maŭ donacis al Ĉefministro Tanaka Kakuej kolekton de *Ĉu Ci Ĝi Ĝu*.



Prezidanto Maŭ Zedong intervidiĝas kun Ĉefministro Tanaka Kakuej. En la japana flanko ĉeestis Ohira Masajoŝi, ministro de eksteraj aferoj kaj Nikajdo Susumu, ĉefo de la kabineta kancelario. En la ĉina flanko ĉeestis Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj, Gi Pengfej, ministro de eksteraj aferoj, Liaŭ Ĉengĝi, konsilanto de la Ministerio de Eksteraj Aferoj kaj prezidanto de la Ĉina-Japana Amikeca Asocio kaj interpretistoj Lin Lijun kaj Vang Hiaŭhian.




Antaŭtagmeze de la 25-a de septembro, Ĉefministro Tanaka Kakuej, Ministro Ohira Masajoŝi, Kancelaria Ĉefo Nikajdo Susumu kaj aliaj atingis Pekinon. Manpremas kun ili sur la aerodromo por esprimi sian bonvenigon Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj; Je Gianjing, vicprezidanto de la Milita Komisiono kaj vicprezidanto de la Nacidefenda Konsilantaro; Guo Moĵuo, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso kaj honora prezidanto de la Ĉina-Japana Amikeca Asocio; Ĝoŭ Gianjen, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso; Gi Pengfej, ministro de eksteraj aferoj; Liaŭ Ĉengĝi, konsilanto de la Ministerio de Eksteraj Aferoj kaj prezidanto de la Ĉina-Japana Amikeca Asocio; kaj aliaj.



Ĉefministro Tanaka Kakuej, akompanata de Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj, revuas la honoran gvardion de la tera, mara kaj aera fortoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo.








民族联合起来！



Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj kaj Ĉefministro Tanaka Kakuej faras interparolon



La Komuna Deklaro de la Registaro de la Ĉina Popola Respubliko kaj la Registaro de Japanio estas subskribata en Pekino je la 29-a de septembro.



La ministroj de eksteraj aferoj de Ĉinio kaj Japanio Gi Pengfej kaj Ohira Masajoŝi faras interparolon.





Ĉefministro Tanaka Kakuej kaj aliaj vizitas Ding-maŭzoleon de Ming-dinastio, en akompano de Ministro Gi Pengfej, Vu De, ĉefkomitatano de la Revolucia Komitato de Pekino, kaj aliaj.




庆贺中日邦交的建立！
中日国交の樹立を祝う！



Ĉefministro Tanaka Kakuej kaj aliaj japanaj gastoj vizitas Makiaŭ-popolkomunumon de Ŝanhajo, en akompano de Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj kaj Ĝang Ĉunkiaŭ, ĉefkomitatano de la Revolucia Komitato de Ŝanhajo.

En la 29-a de septembro, Ĉefministro Tanaka Kakuej, en akompano de Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj kaj aliaj, forlasas Pekinon por veturi al Ŝanhajo. Jen ĉinaj ŝtataj gvidantoj kaj pli ol dumil pekinaj popolanoj varme adiaŭas la gastojn en la aerodromo.

Ĉefministro Tanaka Kakuej manpremas kun Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj je sia adiaŭo en la ŝanhaja aerodromo.

Antaŭtagmeze de la 30-a de septembro, antaŭ la reveno al sia lando, Ĉefministro Tanaka Kakuej kaj aliaj japanaj gastoj, akompanataj de Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj kaj Ĉefkomitatano Ĝang Ĉunkiaŭ, adiaŭas 6,000 ŝanhajanojn de diversaj rondoj en la aerodromo.







# KOMUNA DEKLARO

## de la Registaro de la Ĉina Popola Respubliko kaj la Registaro de Japanio

Laŭ la invito de Ĝoŭ Enlaj, ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko, Tanaka Kakuej, ĉefministro de la Kabineto de Japanio vizitis la Ĉinan Popolan Respublikon de la 25-a ĝis la 30-a de septembro, 1972. Ĉefministron Tanaka Kakuej akompanis Ohira Masajoŝi, ministro de eksteraj aferoj, Nikajdo Susumu, ĉefo de la Kabineta Kancelario kaj aliaj registaraj oficistoj.

Prezidanto Maŭ Zedong intervidiĝis kun Ĉefministro Tanaka Kakuej en la 27-a de septembro. Ambaŭ flankoj faris seriozan kaj amikan interparolon.

Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj kaj Ministro de Eksteraj Aferoj Gi Pengfej serioze kaj malkaŝeme interŝanĝis opiniojn kun Ĉefministro Tanaka Kakuej kaj Ministro de Eksteraj Aferoj Ohira Masajoŝi, ĉiam en amika atmosfero, pri diversaj problemoj inter la du landoj kaj aliaj problemoj interesantaj ambaŭ landojn, kun la normaligo de rilatoj inter Ĉinio kaj Japanio kiel la fokusa punkto, kaj la du flankoj konsentis publikigi la jenan komunan deklaron de la du registaroj:

Ĉinio kaj Japanio estas najbaraj landoj apartigitaj nur de strio da akvo, kaj inter ili ekzistas longa historio de tradicia amikeco. La du popoloj arde deziras fini la nenormalan staton ĝis nun ekzistantan inter la du landoj. La finiĝo de la milita stato kaj la normaligo de rilatoj inter Ĉinio kaj Japanio — la realiĝo de tiuj deziroj de la du popoloj malfermos novan paĝon en la historio de rilatoj inter la du landoj.

La japana flanko akre konscias sian respondecon pro la grandegaj damaĝoj, kiujn kaŭzis Japanio al la ĉina popolo per milito en la pasinteco, kaj profunde sin riproĉas. La japana flanko reasertas sian vidpunkton, ke ĝi serĉas realiĝon de normaligo de rilatoj inter Japanio kaj Ĉinio starante sur la starpunkto de plena kompreno de la tri principoj por restarigo de diplomatiaj rilatoj elmetitaj de la registaro de la Ĉina Popola Respubliko. La ĉina flanko esprimas sian bonvenigon al tio.

Kvankam malsamaj estas la sociaj sistemoj de Ĉinio kaj Japanio, ili tamen devas kaj povas establi inter si pacajn kaj amikajn rilatojn. La normaligo de rilatoj kaj la disvolvo de bon-najbaraj kaj amikaj rilatoj inter la du landoj konformas al la intere-

soj de la du popoloj kaj ankaŭ kontribuos al mildigo de la streĉa situacio en Azio kaj gardado de mondpaco.

1) La nenormala stato ĝis nun ekzistanta inter la Ĉina Popola Respubliko kaj Japanio estas proklamita kiel finita ekde la tago de publikigo de tiu ĉi deklaro.

2) La registaro de Japanio agnoskas la registaron de la Ĉina Popola Respubliko kiel la unike leĝan registaron de Ĉinio.

3) La registaro de la Ĉina Popola Respubliko reasertas ke Tajvan estas neapartigebla parto de la teritorio de la Ĉina Popola Respubliko. La registaro de Japanio plene komprenas kaj respektas ĉi tiun starpunkton de la registaro de Ĉinio kaj persistas en sia starpunkto pri observo de la oka artikolo de la Pocdam-a Proklamo.

4) La registaro de la Ĉina Popola Respubliko kaj la registaro de Japanio decidis establi inter si diplomatiajn rilatojn ekde la 29-a de septembro, 1972. La du registaroj decidis preni ĉiujn necesajn rimedojn por la establo kaj plenumo de funkcioj de ambasadorejo en siaj respektivaj ĉefurboj laŭ la internaciaj leĝo kaj kutimo kaj interŝanĝi ambasadorojn kiel eble plej rapide.

5) La registaro de la Ĉina Popola Respubliko deklaras ke por la amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Japanio, ĝi rezignas sian postulon pri militaj rekompencoj de Japanio.

6) La registaro de la Ĉina Popola Respubliko kaj la registaro de Japanio interkonsentis establi longdaŭrajn rilatojn de paco kaj amikeco inter la du landoj sur la bazo de la principoj de reciproka respekto al suvereneco kaj teritoria integreco, reciproka neagreso, reciproka neinterveno en internajn aferojn, egaleco kaj reciproka utilo kaj paca kunekzisto.

Laŭ la supredIritaj principoj kaj la principoj de la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj, la registaroj de la du landoj konfirmas, ke en iliaj reciprokaj rilatoj ĉiuj disputoj estos solvitaj per paca rimedo, sen sinturno al uzo de aŭ minaco per forto.

7) La normaligo de rilatoj inter Ĉinio kaj Japanio ne estas direktata kontraŭ triaj landoj. Neniu el la du landoj devas serĉi hegemonion en la regiono de Azio kaj Pacifiko kaj ĉiu el ili oponas kontraŭ klopodoj de ĉiu ajn alia lando aŭ grupo de landoj por starigi tian hegemonion.

8) Por firmigi kaj disvolvi la pacajn kaj amikajn rilatojn inter la du landoj, la registaro de la Ĉina Popola Respubliko kaj la registaro de Japanio interkonsentas konduki intertraktadon kun la celo konkludi traktaton de paco kaj amikeco.

9) Por pluapaŝe disvolvi la rilatojn inter la du landoj kaj plivastigi la interŝanĝon de vizitoj, la registaro de la Ĉina Popola Respubliko kaj la registaro de Japanio interkonsentas konduki intertraktadojn kun la celo konkludi interkonsentojn pri komerco, navigado, aviado, fiŝkaptado ktp., laŭ la bezonoj kaj en konsidero pri la ekzistantaj ne-registaraj interkonsentoj.

| | |
|---|---|
| **Ĝoŭ Enlaj**<br>(Subskribo)<br>ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko | **Tanaka Kakuej**<br>(Subskribo)<br>ĉefministro de la Kabineto de Japanio |
| **Gi Pengfej**<br>(Subskribo)<br>ministro de eksteraj aferoj de la Ĉina Popola Respubliko | **Ohira Masajoŝi**<br>(Subskribo)<br>ministro de eksteraj aferoj de Japanio |


Pekino, la 29-an de septembro, 1972



Post akompano al Ĉefministro Tanaka Kakuej en lia vizito al Ŝanhajo, Ĉefministro Ĝoŭ Enlaj, Ministro Gi Pengfej, Vicministro Han Nianlong, Vicministro Ju Sang kaj aliaj revenas al Pekino per speciala aviadilo je la tagmezo de la 30-a de septembro. Ilin varme bonvenigas en la aerodromo Giang King, Je Gianjing,




Jaŭ Venjŭan, Li Hiannian, Gi Dengkuj, Li Deŝeng, Vang Donghing kaj aliaj gvidantoj de la Partio, registaro kaj ĈPLA, kaj respondeculoj de la koncernaj departementoj kaj pli ol 6,000 popolanoj de Pekino.



Ĉefministro Tanaka Kakuej kaj aliaj japanaj gastoj ekskursas sur la Granda Muro.

# 1-a Azia Tablotenisa Ĉampioneca Turniro




Aldono al n-ro 11, 1972

EL POPOLA ĈINIO

# Por Plifortigi Amikecon kaj Solidarecon

## —Pri la Unua Azia Tablotenisa Ĉampionado



Getablotenisistoj de Ĉinio, Koreio kaj Kamboĝo kune ekzercas kaj studas ludarton.



Vjetnama tablotenisistino Do Thuy Nga (*la maldekstra*) kaj laosaj tablotenisistinoj Vanh Thong (*la meza*) kaj Douang Phakay interŝanĝas sperton.



Kunbatalantoj
la Respubliko
Suda Vjetnam
vizitas la Pekin
Fabrikon de M
tiartaĵoj.

POR plifortigi amikecon kaj solidarecon inter la aziaj popoloj kaj sportistoj kaj akceli la disvolviĝon kaj altiĝon de la tablotenisa sporto de Azio, la Azia Tablotenisa Unio okazigis la Unuan Azian Tablotenisan Ĉampionadon de la 2-a ĝis la 13-a de septembro, 1972, en la Ĉefurba Sporthalo de Pekino.

La ĉampionadon partoprenis jenaj 31 aziaj landoj kaj regionoj: Afganio, la Araba Respubliko de Jemeno, Bhutano, Birmo, Kamboĝo, Cipro, la Demokratia Popola Respubliko de Koreio, la Vjetnama Demokratia Respubliko, Hongkongo, Hindio, Irano, Irako, Japanio, Jordano, Kuvajto, Laoso (Laosa Patriota Fronto), Libano, Aŭmen, Malajzio, Nepalo, Pakistano, Palestino, la Popola Demokratia Respubliko de Jemeno, Filipinoj, la Respubliko de Suda Vjetnamio, Singaporo, Sri-Lankao, Sirio, Tajlandó, Turkio kaj Ĉinio.

Dum la ĉampionado okazis naŭ konkursoj de vira teamo, virina teamo, vira unuopo, virina unuopo, vira duopo, virina duopo, miksita duopo, knaba unuopo kaj knabina unuopo. Rezulte de la konkursoj, la japana vira teamo gajnis la ĉampionecon de vira teamo, la ĉina virina teamo gajnis la ĉampionecon de virina teamo, la japana sportisto Nobuhiko Hasegava gajnis la ĉampionecon de vira unuopo, la ĉina sportistino Li Li gajnis la ĉampionecon de virina unuopo, la japanaj sportistoj Micuru Kohno kaj Tecuo Inoue gajnis la ĉampionecon de vira duopo, la koreaj sportistinoj Kim Ĉang Ae kaj O Jong Suk gajnis la ĉampionecon de virina duopo, la japanaj gesportistoj Nobuhiko Hasega-



Sportistinoj de Kamboĝo kaj Sri-Lankao faras subskribon unu al alia por memoro.

va kaj Jasuko Konno gajnis la ĉampionecon de miksita duopo, la korea Pak Ĝeng Ĉel gajnis la ĉampionecon de knaba unuopo kaj la korea Ro Ok Sun gajnis la ĉampionecon de la knabina unuopo.

Tiu ĉi ĉampionado okazis sub la nova situacio de solidareco kaj progreso de la aziaj popoloj. Ĝi estas la unua internacia konkurso en la historio de Azio, en kiu partoprenis tiel multaj sportistoj de aziaj landoj kaj regionoj. Ĝi pruvis konvinke, ke plifortigi amikecon kaj solidarecon estas la komuna deziro kaj urĝa postulo de la aziaj landoj kaj estas ankaŭ nebarebla historia fluo.

La ĉampionadon ĉiam regis amikeco kaj solidareco. La sportistoj estas kaj rivaloj kaj amikoj. Antaŭ la maĉoj, ili kune ekzercis kaj interhelpis; post la maĉoj ili interŝanĝis sperton kaj kuraĝigis unu alian. En la konkursejo, ili ĉiam metis amikecon kaj solidarecon en la unuan lokon. "Amikeco pli gravas ol konkurso" jam fariĝis ĝenerala nova moro. La sportistoj de diversaj landoj kaj regionoj kune studis tablotenisan teknikon kaj lernis unu de alia por kune altigi la nivelon de tiu sporto, tiel ke novaj stilo kaj nivelo estis starigitaj en tiu ĉi ĉampionado.

En la vira kaj virina teamaj konkursoj, kiuj daŭris 4 tagojn, la fortaj teamoj de Japanio, Koreio kaj Vjetnamio refoje montris siajn potencajn fortojn, kaj la teknika nivelo de la teamoj de Irano, Sirio kaj Nepalo rapide altiĝis. Tio montris, ke la tablotenisa sporto de Azio estas en bonega situacio de ĝeneraliĝo, disvolviĝo kaj altiĝo. La tablotenisaj sportistoj de Ĉinio plue disvolvis la

Ĉinaj kaj japanaj sportistoj iras en la konkursejon mano-en-mane.



Vjetnamaj gesportistoj kantas en la amuza kunveno en la Somera Palaco.



spiriton "unue amikeco, due sporto" kaj dum la konkursado lernis valorajn spertojn de tablotenisaj amikoj de diversaj landoj kaj regionoj kaj altigis sian ludarton. La 6-an de septembro, la korea kaj japana teamoj faris viran teaman konkurson kaj rikoltis varmajn aplaŭdojn de la rigardantoj. La kvarhora konkurso trairis 9 maĉojn. En la komenco de la konkurso, la korea teamo gajnis tri sinsekvajn maĉojn. Je la kvara maĉo, la japana teamano Micuru Kohno per ĉetabla rapida atakado kun ambaŭflanka frapado gajnis la unuan poenton por la japana teamo per venko en du sinsekvaj setoj. Poste, je la 5-a maĉo, Pak Sin Il venkis Nobuhiko Hasegava, tiel ke la korea teamo estis je 4 kontraŭ 1 super la japana. En tia malfavora situacio, la japanaj teamanoj tamen tute ne deprimiĝis. Ili prenis lecionon el la malsukcesoj kaj per obstina batalado gajnis sinsekvajn 3 maĉojn. Tiam la registro de la du teamoj estis 4 kontraŭ 4. Je la 9-a maĉo, kiu decidis la finan venkon, ambaŭ teamoj gajnis po unu seton. Je la tria seto, la japana teamo venkis la korean per 21 kontraŭ 17. La japana teamo gajnis la finan venkon per 5 kontraŭ 4. En la virina teama konkurso, la ĉina kaj japana teamoj streĉege batalis je la 5-a de septembro. La japana sportistino Jukie Ohzeki unuafoje batalis kontraŭ la ĉina sportistino Li Li. Ŝi gajnis 1 poenton por la japana teamo je la komenco. En la sekvantaj tri maĉoj, la ĉinaj Hu Julan kaj Ĉoŭ Baŭkin gajnis ne nur la duopan maĉon, sed ankaŭ venkis la japanajn Miho

Hamada kaj Jukie Ohzeki en du unuopaj maĉoj. En la lasta maĉo, Hu Julan disvolvis spiriton de daŭra batalado, faris platfrapojn je oportunaj ŝancoj dum tranĉfrapado kaj gajnis la unuan seton super Jukie Ohzeki. Sed la lasta, kiu estas lerta en atako kaj defendo, tute ne deprimiĝis. La duan seton ŝi gajnis per spertaj tranĉfrapoj kaj potenca atakado. Je la tria seto, Hu Julan plifortigis sian atakon. Aplombe kaj sagace ŝi faris atakajn frapojn dum tranĉfrapado kaj tuj sekvigis atakadon post startigo de pilko. Tiamaniere ŝi venkis en la lasta seto. La ĉina teamo gajnis la konkurson per 3 kontraŭ 1.

La malgranda arĝenta pilko transdonas amikecon. Hodiaŭ ĝi interligas milionojn kaj milionojn da popolanoj kun malsamaj lingvoj kaj malsamaj haŭtokoloroj. Post sia veno al Pekino, la korea tablotenisa teamo kvarfoje faris ekzercon kune kun la ĉina teamo, kaj ili kune kantis la "Kanton de Generalo Kim Il Sen" kaj "Ruĝas la Oriento". La vjetnamaj kaj laosaj sportistoj venintaj de la kontraŭusona fronto rakontis al aliaj pri la disvolviĝo de tablotenisa sporto sub la kondiĉoj de militado. Ili mem faris frapilojn kaj tablotenisajn tablojn el kuglokestoj. Kiam malamikaj aviadiloj venis, ili batalis kontraŭ ili, kaj kiam la aviadiloj forflugis, ili ekludis tablotenison. Prave diris la laosa sportisto Thong Inh: "Plifortigi solidarecon kaj amikecon inter la popoloj de la aziaj landoj per la tablotenisa ludo estas parto de nia nacisava batalo kontraŭ la usonaj agresan-





La ĉampiono de vira teamo (*Japanio*)


toj. Tiel la pafilo kiel la frapilo en niaj manoj servas al la sama celo, nome venki la ferocan malamikon usona imperiismo!" La kamboĝa sportisto Khau Bou, kiu partoprenis la ĉampionadon, estas la ĉampiono de vira unuopa tablotenisa konkurso de Kamboĝo. Antaŭ duonjaro, li estis en Pnompeno sub la regado de la kliko de Lon Nol. La khmera naciliberiga afero altiris lin kaj fine li sin liberigis el la regado de la kliko de Lon Nol, profitante la okazon de partopreno de eksterlanda konkurso, kaj transvenis sub la standardon de la Nacia Unueca Fronto de Kamboĝo gvidata de Samdek Norodom Sihanuk. Tiu ŝanĝiĝo en la tablotenisistaro de Kamboĝo estas solida pruvo pri la vigla disvolviĝo de la naciliberiga afero de la aziaj popoloj.

La 7-an de septembro, la sportistoj de diversaj landoj kaj regionoj okazigis grandiozajn amuzajn aktivadojn en parkoj kune kun pekinaj popolanoj. Tiutage, ĉie en la Somera Palaco de Pekino estis ĝojaj amasoj, kaj aziaj geamikoj kune dancis kaj kantis por amikeco. Dum la ĉampionado, la sportistoj de diversaj landoj kaj regionoj vizitis iujn pekinajn fabrikojn kaj vilaĝojn en la antaŭurbo de Pekino kaj vizitis famajn lokojn de historiaj restaĵoj.


Partiaj kaj registaraj gvidantoj kaj koncernaj respondeculoj de nia lando ĉeestis la inaŭguran kaj ferman ceremoniojn de la 1-a Azia Tablotenisa Ĉampionado kaj rigardis konkursadon.



La ĉampiono de virina teamo (*Ĉinio*)



La ĉampiono de knabina unuopo Ro Ok Sun (*Koreio*)



Nepalaj kaj irakaj sportistoj manpremas post la maĉo.


Dum la ĉampionado, okazis samtempe en Pekino la 1-a Kongreso de la Azia Tablotenisa Unio kaj Kunveno de la Prepara Komitato de la Tablotenisa Amikeca Invita Turniro de Azio, Afriko kaj Latinameriko. La du kunvenoj decidis respektive okazigi la 2-an Azian Tablotenisan Ĉampionadon en Japanio je printempo de 1974, kaj la 1-an Tablotenisan Amikecan Invitan Turniron de Azio, Afriko kaj Latinameriko en Pekino je aŭgusto aŭ septembro de 1973.

La 14-an de septembro, partiaj kaj registaraj gvidantoj kaj koncernaj respondeculoj de nia lando Dong Bivu, Ĝu De, Ĝoŭ Enlaj, Je Gianjing, Ĝang Ĉunkiaŭ, Jaŭ Venjuan, Li Hiannian, Gi Dengkuj, Li Deŝeng, Vang Donghing, Guo Moĵuo, Vang Hongven, Hua Guofeng, Gi Pengfej, Vu De, Vang Meng, Liaŭ Ĉenggi kaj Ding Hilin intervidiĝis kun la tablotenisaj amikoj kaj sportistoj de diversaj landoj kaj regionoj, kiuj partoprenis en la 1-a Azia Tablotenisa Ĉampionado, la 1-a Kongreso de la Azia Tablotenisa Unio kaj la Kunveno de la Prepara Komitato de la Tablotenisa Amikeca Invita Turniro de Azio, Afriko kaj Latinameriko. Ili varme gratulis ilin pro la plenaj sukcesoj de la ĉampionado kaj la du kunvenoj. Poste, niaj partiaj kaj registaraj gvidantoj estis fotitaj kune kun ili.


La tempo antaŭen marŝas. La solidareco kaj amikeco inter la aziaj popoloj senĉese kreskas kaj disvolviĝas. La fondiĝo de la Azia Tablotenisa Unio estas celebrinda iniciato. Tiu ĉi vere nova reprezentantiva internacia sporta organizo persistas en la principo, ke la grandaj kaj malgrandaj asocioj devas esti egalecaj, respekti unu alian kaj konsiliĝi demokratie. Ĝi ricevis vastan aprobon kaj subtenon de la diverslandaj popoloj kaj tablotenisaj rondoj de Azio kaj la sukcesa okaziĝo de la grandioza 1-a Azia Tablotenisa Ĉampionado montris la potencan vivforton de la Azia Tablotenisa Unio. Ni profunde konvinkiĝis, ke puŝate de la ĝenerala historia fluo ke la diverslandaj popoloj volas amikecon, unuiĝon kaj progreson, la tablotenisa ĉampionado aranĝota de la Azia Tablotenisa Unio certe pli kaj pli grandigos sian skalon kaj montros sin vivecplena.




Kuvajtaj amikoj en la amuza kunveno




Estroj de la malajzia kaj pakistana tablotenisaj delegacioj amike interparolas.



Ŝportistinoj de la Popola Demokratia Respubliko de Jemeno kaj Ĉinio interŝanĝas ludarton.



Antaŭ komenciĝo de maĉo la palestina kaj siria sportistoj interŝanĝas insignojn.



Ĉinaj kaj birmaj sportistinoj rigardas fotojn de amikeco.




Thuji Yonten (*la tria de maldekstre*), estro d[e] la Delegacio de la Bhu-tana Fizikkultura Or-ganizo, kaj aliaj vizitas la Pekinan Fabrikon de Grandaj Elektromotoroj.

a tablotenisaj delega-
oj de la Araba Respu-
liko de Jemeno kaj
Iongkongo vizitas la
nfanĝardenon de la
ekina Unua Maŝinfa-
riko.



esportistoj de Singapo-
o kaj Aŭmen vizitas la
Ĉina-Vjetnaman Amike-
an Popol-komunumon
n antaŭurbo de Pekino.
en gastino tie ludas
ablotenison kun knabo.






Cipraj amikoj vizitas la Grandan Muron.

Libanaj amikoj kun ĉinaj infanoj

Diverslandaj amikoj en la amuza kunveno en la Popola Halo




Afganaj amikoj vizitas moskeon en Pekino.




友







Interparolas iranaj, palestinaj kaj filipinaj gesportistoj.

La ĉampiono de vira unuopo
Nobuhiko Hasegava (*Japanio*)






La hinda amiko vizitas Dongbejvang-komunumon en antaŭurbo de Pekino.



La ĉampiono de virina duopo Kim Ĉang Ae kaj O Jong Suk (*Koreio*)





La ĉampiono de virina unuopo Li Li (*Ĉinio*)



Turkaj kaj jordanaj geamikoj rigardas programerojn en la Somera Palaco.



Iranaj kaj tajlandaj sportistinoj reciproke subskribas por memoro.



Varman Bonvenon!